Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaudon la 12-an de januaro 2022 per Zoom

Ĉeestis
Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget, Marianne Lund.

1. Aprobo de la tagordo
Ni aprobis la tagordon.

2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 5-an de decembro 2022
La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis.

3. Esperantonia
Ni pludiskutos la temon en la estraro kiam ni havos pli da informoj de la klubo de Oslo.

4. Jarraporto 2022
Ni plulaboras pri la verkado de la jarraporto pri 2022, kiu havos pli simplan formon, ol en antaŭaj jaroj. Claude kaj Marianne pretigos la membrostatistikon kaj la membroregistron.

5. Skanado de Norvega Esperantisto
Ni provu organizi skanadon de Norvega Esperantisto per la projekto bitarkivo.org en Hispanio ene de ne tro multe da tempo.

6. La heredaĵo de Ester Olsen
Bård informis pri sia kontakto kun la advokato pri tiu temo. Neniuj gravaj novaĵoj.

7. Eventualaĵoj
Statuto de NEL: Claude tralegos la statuton por serĉi punktojn, nepre ŝanĝendajn dum la landa kunveno.

8. Venonta estrara interkonsiliĝo
La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 25-an de januaro je la 20-a horo.

Protokolis Marianne Lund